





tejo

tutmondo

tutmonda esperantista junulara organizo



Sukcese pasis la 63-a IJK en Vjetnamujo

**Esperanto
en Alĝerio**

**Rusiaj
Esperanto-
Tagoj**

**Simbolo por
la 100-jariĝo
de UEA**



Saluton!

En ĉi tiu numero vin atendas pluraj raportoj pri la IJK, kiu ĉi-jare altiris ĉirkaŭ 200 junajn esperantistojn al Hanojo (Vjetnamujo). Aldone vi povos legi salutmesaĝon de la nova TEJO-prezidanto Haris SUBAŠIĆ el

Bosnio-Hercegovino.

Ekde kiam mi kompilis la antaŭan numeron de TEJO Tutmonde, okazis grava kaj bela ŝanĝo en mia persona vivo: Mi edziĝis. Pri tio vi povos legi sur la lasta paĝo – same kiel pri la edziĝo de la TEJO-estrarano François HOUNSOUNOU.

Mi deziras al vi aĝrablan legadon!

Marcos

Enhavo

Salutvorto de la prezidanto	3
Nepalano raportas pri la IJK en Hanojo	3-7
Retpaĝaro kun simplaj samsignifaj vortoj	7
Raporto pri la Rusiaj Esperanto-Tagoj	8-9
Aŭstraliano raportas pri la IJK	9
Koreo raportas pri la IJK	10-13
Slava renkontiĝo	14
Kiel fartas Esperanto en Alĝerio?	15
Simbolo por la 100-jariĝo de UEA	16
500 studentoj eklernas E-on en Ĉinio	16
Eo-kurso en la universitato de Stokholmo ...	17
Beletra Almanako	17
E@I kun nova jura stato	17
Gerhard HIRSCHMANN en Afriko	18
Internaciaj ekzamenoj de ILEI dum IS	18
Kontakt-informoj kaj informoj pri TEJO	19
Geedziĝo de François & Clémentine	
HOUNSOUNOU en Benino/Afriko	20
Geedziĝo de Marcos kaj Uljana CRAMER	20

Ne forgesu rektizi!

Jes, jam alvenis la tempo por remembrigi en TEJO (aŭ re-patroniĝi) por 2008. Bonvolu fruerektizi por ke via ricevado de *Kontakto* kaj *TEJO Tutmonde* ne estu interrompita. Ne forgesu ke, krom ricevado de la interesaj kaj informplenaj TEJO-revuoj, via membreco rajtigas vin ricevi rabaton je la partoprenkotizo de la IJK (kiu en 2008 okazos en Hungario)! Memoru, TEJO estas via asocio - helpu ankaŭ vi ke ĝi estu forta kaj aktiva en 2007! Kontaktu la Centran Oficejon, aŭ aliĝu rete ĉe: www.uea.org/alighoj

Limdato por 2007:6 – 15-a de januaro 2008!

TEJO Tutmonde estas dumonata oficiala gazeto de TEJO pri la junulara Esperanto-movado. Ĝin ricevas ĉiuj individuaj membroj kaj patronoj de TEJO. Landaj junularaj Esperanto-organizaĵoj povas ricevi ĝin.

Kontribuojn sendu (prefere) rete al tejo-tutmonde@tejo.org (per normala mesaĝo aŭ kiel kunsendita tekst-dosiero), aŭ paperpoŝte al la adreso: TEJO Tutmonde (Marcos CRAMER), Nürnberger Straße 27a, 04103 Leipzig, Germanio. Fotojn/bildojn sendu kiel JPEG. **Viaj kontribuoj estas bonvenegaj kaj necesaj!**

Aliaj Esperanto-gazetoj rajtas publikigi artikolojn el TEJO Tutmonde kondiĉe ke ili mencias la fonton. Redaktisto: **Marcos CRAMER** (Germanio/Britio). Demandojn pri membrecoj, abonoj, distribuo ktp. sendu al: TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando; rete: oficejo@tejo.org. Presado: SKONPRES, Bydgoszcz, Pollando; rete: skonpres@poczta.onet.pl. **La redakcio kaj la eldonanto ne respondecas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj.**

Salutmesaĝo de la nova TEJO-prezidanto

Saluton, karaj geamikoj!

Ĉi-foje mi skribas al vi estante en nova rolo – prezidanto de TEJO. Kiel vi verŝajne scias, ni ne sukcesis okazigi ordinarajn estrarajn elektojn dum IJK en Vjetnamio, pro manko da kvorumo en la komitat-kunsido. Tial nuna estraro daŭrigas oficojn ĝis kiam okazos la elektoj (kiujn ni klopodas organizi jarfine). Bedaŭrinde, David-Emil ne sukcesis kunlabori plu pro privataj okupoj, kaj mi tial transprenis gvidadon de la organizo. Mi volas danki al David-Emil ankoraŭfoje, nome de ĉiuj en TEJO, por lia laŭdinda ĝisnuna aktivado!

Sed, tio ne estas unusola novaĵo en nia organizo! TEJO-estraro elektis gastiganton de IJK 2008. La kongreso okazos en Hungario, en la urbo Szombathely, inter la 26a de julio kaj la 2a de aŭgusto, sub la temo 'Minoritataj rajtoj'. Bonvenon al ĉiuj!

Komence de novembro ankaŭ okazas ŝanĝo en la oficejo. Finiĝas la kontrakto kun nuntempa volontulino – Katarzyna MARCINIK, kiu tre multe helpis al la funkciado de TEJO dum pasintaj monatoj. Kaj ŝiajn taskojn transprenas Julia NOE el



Germanio. Pri tio vi povos legi multe pli en la venonta numero.

TEJO-umu kaj bonfartu!

Sincere via
Haris SUBAŠIĆ
Prezidanto de TEJO

Nepalano raportas pri la 63-a IJK en Hanojo

Dank' al KAEM, TEJO, NEspA kaj aliaj individuoj, kiuj kuraĝigis nian grupon finance kaj morale por la vojaĝo al Vjetnamio por partopreni 63-an IJK, ni sesope (Bharat, Shakuntala, Binita, Mukunda, Santosh kaj mi) komencis vojaĝon al IJK en Vjetnamio je la 20a de Julio. Ni rekte flugis al Ĉengdu, la urbo de Ĉinio el Katmanduo kaj la esperantistoj de Ĉengdu akceptis nin en flughaveno, kaj akompanis nin ĝis al hotelo. Estis ĝojiga tempo por ni, ĉar krom Bharat, ni ĉiuj unuafoje estis eksterlande. Esperantistoj tie invitis nin por vespermanĝo kaj ni volonte akceptis la proponon. Ili estis du esperantistoj

kaj aliaj estis iliaj geamikoj sed ni propagandis pri esperanto dum la vespermanĝo kaj ili interesiĝis pri tio.

La 21-an de Julio ni forlasis Ĉengdu kaj komencis vojaĝi al Kunming per trajno, alia bela kaj moderna urbo de Ĉinio. Ni pasis 24 horojn en la trajno sed multe ĝuis. Ni dancis, kantis, rigardante la belajn vidindaĵojn ekstere. Ni ankaŭ amuziĝis kun vojaĝantoj de la trajno dancante kaj kantante, kaj samtempe ni propagandis nian lingvon.

Matene de la 22-a de Julio ni atingis Kunming, alia bela urbo de Ĉinio, kaj tie ankaŭ esperantisto S-ro Spado (Ĝi Jen)

akceptis nin en trajnstacio. La vetero en Kunming estis iom malvarma pro pluvo. Li gvidis nin ĝis nia vojaĝo al Vjetnamio. Li helpis nin akiri vizon de Vjetnamio, ŝanĝi la monon, promenadi en diversajn lokojn en Kunming ktp. Ni ankaŭ konatiĝis kun aliaj geesperantistoj de Kunming. Yunan Esperanto-Asocio, la loka organizo, okazigis la kunvenon por dividi sperton inter Nepalaj esperantistoj kaj la lokaj. Ili ne povas bone paroli en Esperanto, tamen S-ro Spado tradukis la lingvon en ĉinan kaj Esperanton. Ankaŭ ni povis iomete scii el iliaj vizaĝoj ke ili estis feliĉaj renkonti nin kaj ilia penso estas altnivela. Ili invitis nin por la vespermanĝo en tiu tago kaj ni babilis pri diversaj temoj kun ili. Ni vizitis diversajn lokojn en Kunming kaj en la nokto ni kantis, babilis kaj dancis en la hotelĉambro.

Post tri tagoj en Kunming, ni komencis vojaĝon al Hanojo, unue per buso ĝis la landlimo de Ĉinio, kaj poste ni vojaĝis al Hanojo per trajno. Ni pasigis preskaŭ 14 horojn en la buso kaj atingis Lauĉi, la landlimon inter ambaŭ landoj je la oka matene. Ni trapasis la landlimon je la unua sed la tempo por nia trajno estis la 8-a je la nokte.



La golfo Ha Long

Do, ni havis multe da tempo, pro tio ni promenis ĉirkaŭ Laŭkaj. Poste, ni decidis pasigi la tempon en restoracio babilante, trinkante kaj kantante. Homoj ne povis kompreni nian lingvo, tamen ili ĝuis rigardante nin, ĉar niaj vestaĵoj kaj lingvoj estis mirindaj por ili. Poste ni revenis en agentejon tie, kie estis niaj valizoj, kaj tuj iris al trajnstacidomo kun la helpo de la gvidantino. Ni bezonis dek horojn por atingi Hanojon.

Ni atingis Hanojon je la 4-a matene. Ni ripozis en la stacidomo ĝis la 6-a kaj du volontulinoj akceptis nin tie. Poste, ili akompanis nin ĝis la kongresejo kiu estis en universitata studenta domo. Tie estis multaj studentoj en la ĉambro kaj ni iomete parolis kun ili. Poste ni iris al nia ĉambro. Tiu tago estis la 26-a, unu tago antaŭ la komenco de la kongreso. La vetero estis ege varma kaj humida por ni.

En la programo estis preskaŭ 300 partoprenantoj. Unua tago estis la Interkona Vespero. Esperantistoj prezentis la kantojn kaj volontuloj de Vjetnamio prezentis dancojn kaj kantojn. Ni kune kun aliaj esperantistoj ludis ludojn kiuj estis unikaj kaj novaj por ni. Poste ni prezentis Nepalajn kantojn kun danco. Dum la vespero ni babilis kaj konatiĝis kun pli kaj pli da esperantistoj. La universitato havas



Surŝipe dum ekskurso al la golfo Ha Long

belegan parkon, kaj tie ni povis libere promenadi kaj babiladi ĝis noktomezo kun geamikoj.

Je la sekva tago estis la inaŭguro de la 63-IJK, je la 27-a de Julio. Post la matenmanĝo ni ĉiuj estis en salono. Prezidantino de VEJO Sino Hy Li prelegis pri la Esperanto-movado en Vjetnamio kaj la programo kune kun aliaj gravaj esperantistoj: prezidanto de UEA S-ro Renato CORSETTI, vic-prezidanto de TEJO S-ro Haris SUBAŠIĆ ktp. Vjetnama kultura programo estis prezentita post la inaŭguro kaj tio estis tute nova afero por ni. Post la inaŭguro oni prelegis pri Vjetnamio: lingvo, etno, milito kun Usono, popolo, historio ktp. En la vespero estis la ekskurso al nokta bazar. Tie ni promenis rigardante la aĵojn kaj noktan vivon. Ankaŭ ni rigardis la homojn, kiuj kantis kun bela muziko en la strato. Post la promenado ni revenis en la kongresejon.

Je la 29-a komenciĝis la kunsidoj pri la vjetnama lingvo, masaĝo, kantoj, prelego pri herbaj medikamentoj ktp. Tio daŭris tutan matenon ĝis la tagmanĝo. En tiu tago, ankaŭ estis ekskurso al la urbo-centro, kie estis la palaco de Hoĉi Min, iama prezidanto de Vjetnamio kaj ankaŭ aliaj belaj vidindaĵoj ekzemple parkoj, lagoj, oficejo de ministro ktp. En la vespero okazis la diskoteko. Kelkaj dancis kaj aliaj restis ekstere babilante ĝis noktomezo.

La sekvan tagon mi unue estis en la kunsido pri kantoj kaj herbaj medikamentoj kiuj troviĝas en Vjetnamio, kaj post tagmanĝo okazis landaj festivaloj: ĉiuj partoprenantoj vidigis diversajn mapojn kaj manĝaĵojn de iliaj propraj landoj. Ni povis gustumi naciajn manĝojn de diversaj landoj. Vespere estis diskoteko ankoraŭfoje, kiu okazis ĉiunokte post fino de aliaj programeroj.

Je la 31-a de Julio okazis tuttaga ekskurso al Halong Bay. Tio estis ege malproksima, pro tio ni frue matenmanĝis kaj enbusiĝis. Post tri horoj ni atingis Halong. Ni tagmanĝis apud la

maro kaj iomete promenis ĉirkaŭ ĝi. Poste, ni veturis per ŝipo al kaverno. Tie estis multaj insuloj en la maro kaj la kaverno estis en unu insulo, tiu estis ege interesa. Mi jam vizitis kavernon en mia lando, tamen tio estis alia sperto por mi. Ni ĉiuj revenis en la ŝipon kaj post kelkaj minutoj ni haltis en unu insulo por naĝi en la maro. Revenante, ni tre ĝojis rigardante, kantante, babilante en la ŝipo.

La venontan tagon ankaŭ okazis ekskurso, tamen mi estis iom laca kaj tial ne povis iri tien. Sed laŭ miaj geamikoj, la muzeo estis tre interesa. Ili diris, ke la muzeo montras la tutan historian kaj kulturon de la lando. Post tagmanĝo, la programo okazis en la urbo-domo por honori Renaton CORSETTI. Li estis invitita por honorigi en la urbo-domo kune kun landaj reprezentantoj de la kongreso. S-ro Bharat kaj mi estis invititaj kiel reprezentantoj de NEJO kaj NEspA. La urbestro ne povis aranĝi la tempon, do la vicestrino de la urbo akceptis nin. La prezidanto de UEA ricevis medalon kaj li dankis al la urbestro por la grandega subteno al nia



Kim HENRIKSEN (antaŭe estro de Esperanto Desperado – nun ano de Hotel Desperado) koncertis kune kun sia filo dum la IJK (foto el la reta albumo picasaweb.google.de/carolinverena)

movado. Li ankaŭ promesis, ke li klopodos okazigi la UK-n iam estontece en Vjetnamio.

La 2-a de Aŭgusto estis la lasta tago de la kongreso, kaj ankaŭ por ni estis la lasta tago en Vjetnamio. Tiun tagon en la Azia kunsido Vic-prezidanto de NEJO S-ro Mukunda Chhatri, Sekretario de ONES S-ro Santosh Karki kaj Ĝenerala Sekretario de Nespa S-ro Bharat Kumar Ghimire prelegis pri la Esperanto-movado en Nepalo kaj Filipinoj. Ankaŭ landaj reprezentantoj de diversaj landoj prezentis pri sia landa junulara agado.

Post tagmanĝo volontuloj kune kun aliaj esperantistoj prezentis kantojn kaj dancojn de Esperanto. Kaj interesaj kulturaj programoj de Vjetnamio estis prezentitaj. La prezidantino dankis al partoprenantoj fermante la programon. Ĉiuj malĝojis pro tio ke ili disiĝis unu de la aliaj. Vespere ni devis foriri antaŭ la naŭa. Antaŭ tio, ni faris malgrandan programon en kiu mi dancis kaj poste ni ĉiuj Nepalanoj prezentis kanton kaj dancon. Poste ni rapide prenis niajn valizojn kaj forlasis la

kongresejon. Unu voluntulino akompanis nin ĝis la busstacio. Gevolontuloj de Vjetnamio estas ege aktivaj kaj helpemaj.

Ni revenis laŭ sama vojo per trajno kaj poste per buso ĝis Kunming. Esperantisto S-ro Spado akompanis nin ĝis Chonching ĉar ni estis invitetaj por Esperanta Somera Semajno en Chonching. Post la 24-hora veturado en la trajno, ni atingis Chonching. Tie aliaj esperantistoj de Chonching akceptis nin kaj ni rekte iris al hotelo. Post iom da ripozo, ni iris por ekskurso. Ni vizitis diversajn lokojn en Chonching kiel la malnovajn palacojn, muzeon de Mao, ekspozicion de ornamantoj kaj tranĉiloj ktp. Vespere, ni promenis kaj ĝuis kun aliaj geesperantistoj en la hotelo.

Sekvatage matene ni mem promenis kaj ripozis ĉar matene ne estis programo, sed en la vespero estis ekskurso per ŝipo. Tie ni ĉiuj esperantistoj iomete prelegis pri la persona sperto kaj ni kantis, dancis ktp. Esperantistoj tie, volis okazigi venontan azian kongreson kaj ni ĉiuj promesis al ili, ke ni de la Nepala



Komuna foto kun la vic-urbeŝtrino de Hanojo

flanko laŭeble helpas. La esperantistoj en en tiu urbo kapablas okazigi ĝin. Kaj la urbo mem estas vidinda.

La programo en Chonching finiĝis en la 7-a de Aŭgusto. Matene de la 8-a ni revenis al Ĉengdu per trajno. Esperantisto S-ro Xao, S-ro Lee kaj liaj amikoj akceptis nin en la trajnstacio. Ili akompanis nin al diversaj lokoj en Ĉengdu, invitis nin por luksaj vespermanĝoj dum nia restado en Ĉengdu kaj je la 12-a de Aŭgusto lasis nin en la flughaveno. Ni revenis al Katmanduo je la sama tago kun bona sano kaj feliĉo.

Mi unuafoje partoprenis en IJK kaj tio estis ege bona sperto por mi. Mi volas elkore danki al TEJO por doni min tiom grandan ŝancon kaj KAEM, VEJO, NEsPA, NEjO, Ĉinaj Esperantistoj kaj ĉiuj individuoj kiu helpis al mia grupo. Mi ne povas fini mian raporton sen danki al S-ro Bharat Ghimire, kiu gvidis nin ĝis la fino, kaj Hori Yasuo, Franziska Reisel, kiu kuraĝigis nin finance kaj morale. Mi kune kun aliaj kvin Nepalaj amikoj (Shakuntala, Binita, Mukunda, Santosh kaj Bharat) ne nur kolektis novan sperton sed ankaŭ povis interŝanĝi la ideon kun aliaj geesperantistoj de la tuta mondo. Mi partoprenis en diversaj fakakademioj kaj kulturaj programoj; ankaŭ de tiuj programoj mi havis ŝancon lerni pri aliaj kulturoj kaj pensmanieroj. Esperantaj kongresoj vere donas la ŝancon vidi, spekti kaj senti internacian etoson. Aldone mi havis la



Vjetnama tagmanĝo

(foto el la reta foto-albumo
picasaweb.google.de/carolinverena)

ŝancon plibonigi mian lingvon, kolekti ideojn pri la Esperanto-movado, kaj alia grava afero estas enamikiĝi kun volontuloj de la kongreso. Ili multe instruis nin kiel fari tian taskon. Laste mi volas danki al Zamenhof por lia kreado de tiom bona internacia lingvo, kiu estas la nura solvo de la lingva problemo en la mondo.

Archana Joshi el Nepalo

Partopreninto de la 63-a IJK en Vjetnamio

Ĉu vin ankaŭ foje ĝenas, kiam iuj Esperantistoj malfaciligas nian facilan lingvon per vortoj kiel "kurta", "descendi", "frida", "lici" aŭ "femalo", kies signifojn eblas esprimi per facile kompreneblaj kaj tute samsignifaj kunmetaĵoj ("mallonga", "malsupren-ini", "malvarma", "esti permesata", "ino"). Ĉu vi ankaŭ sentas, ke estas maljuste kontraŭ parolantoj de ne-eŭropaj lingvoj, kiam iuj esperantistoj vaste uzas grek-latinajn vortojn, kiujn eŭrop-lingvanoj facile komprenas, sed aliaj nur tre malfacile? Ekz-e "kardiologo", "topografio", "sekundara" aŭ "hidroplano", kiuj samsignifas al la multe pli facilaj vortoj "kor-kuracisto", "map-scienco", "dua-ranga" kaj "mar-aviadilo". Se ankaŭ vi volas, ke Esperanto daŭre plene uzu siajn eblecojn de vortfarado, kaj ke oni ne enkonduku tro multajn nov-radikojn, tiam vi eble interesiĝos pri www.bonalingvo.it/index.php/Simplaj_samsignifaj_vortoj. Tiu repaĝaro listigas kunmetitajn alterativojn al malfacilaj vortoj. La liston gvidas Renato CORSETTI (antaŭa prezidanto de UEA) kunlabore kun multaj aliaj Esperantistoj. Se vi volas kundiskuti pri la enhavo de la listo, vi povas aliĝi al jena dissendolisto: groups.google.com/group/la-bona-lingvo.

Amasa renkontiĝo en apudmara etoso

Inter la 18a kaj la 25a de aŭgusto 2007 en negranda Rusia urbo Primorsko-Ahtarsko, kiu situas ĉe la orienta bordo de la Azova maro, pasis la plej granda ĉi-somera Esperanto-aranĝo de Rusio. Temas pri RET - Rusiaj Esperanto-Tagoj - kiun ĉi-jare partoprenis ĉirkaŭ 180 homoj el 8 landoj (ĉefe el Rusio, kompreneble). Tri tagojn antaŭ la "oficiala" komenco de la aranĝo samloke okazis la tritaga "paroliga periodo" por la partoprenantoj, kiuj ĵus (aŭ antaŭ tre nelonge) finis la bazan kurson de Esperanto.

La aranĝo entute laŭis la tradiciojn de la Sovetiaj Esperanto-tendaroj kaj programe, kaj strukture, kaj eĉ etose. La partoprenantaro estis tre divers-aĝa kaj divers-sperta rilate la lingvo-posedon. Interalie, relative multis infanoj; ili estis pli ol 20, kaj por ili la organizantoj planis kaj realigis apartan programon. Malgraŭ tio, ke la tuta aranĝo ne estis speciale junulara, la gejunuloj, kompreneble, multis kaj donis al la aranĝo sian specialan "aromon".

La aranĝo pasis en tre bona loko, tuj ĉe la maro, kiu – ve! – estis tamen tre malprofunda



Fine de la koncerto de JoMo kvar diversnaciaĵoj (de maldekstre – polo, ruso, franco kaj germano) kantas slovakon kanton ("Mariŝa")... en Esperanto, kompreneble!

por vere ĝui la ĉemaran etoson. Tamen, neniuj malbono sen iom da bono – la malprofundeco de la maro iĝis, ŝajne, la plej populara temo por ŝercoj.

La programo de la aranĝo estis pli-malpli tradicia por la eks-sovetiaj Esperanto-aranĝoj – okazis multaj prelegoj, diskut-rondoj, prezentoj, divers-nivelaj lingvaj kursoj; la vesperoj estis plenaj je diversaj koncertoj, teatraj konkurs(et)oj kaj prezentaĵoj; interalie okazis la furora koncerto de JoMo, kiu (la koncerto) preskaŭ tuj transformiĝis en aktivegan diskotekon. Dum la nokta programo la partoprenantoj povis elekti inter la diskoteko, gufujo (kiu pli similis bardan kafejon, en kiu multaj homoj plenumis siajn kantojn aŭ prezentis diversajn artaĵojn) aŭ simpla komunikado ĉe la maro aŭ ĉe la lignofajro.

Aparte menciindas la dum la aranĝo okazinta seminario "Flugiloj de malfacila vento", kies celo estas pliprofesiigi la komencantajn Esperanto-instruistojn.



La partoprenantoj flugigas balonojn kun la devizo de la aranĝo: "Vi ne solas!"

Bedaŭrinde, la partoprenantoj ĉi-foje ne multis, tamen tiuj, kiuj ja partoprenis kaj sukcese finis la seminarion, restis kontentaj pri ĝi.

Komparante la aranĝon al la plej popularaj junularaj Esperanto-aranĝoj (kiel IJK, IJS kaj similaj) oni certe rimarkas, ke ĝi estis iom

malpli "intensa" progame kaj certe malpli "junulara". Tamen la ĉi-jara RET certe estis bonega kontribuo por plispertigo de malpli spertaj esperantistoj kaj bona praktikejo de Esperanto en ĉarma ĉe-mara etoso.

Paŭlo Moĵajev (Ukrainio)

Impresoj de juna aŭstraliano pri la IJK

Partopreni la 63an Internacia Junulara Kongreso ĉe Hanojo (Vjetnamio) estis granda plezuro, kaj ĝi estis mia unua tutmonda evento por vidi la lingvon kapablon. Kvar membroj de la Melbourne-Esperanto-Kafo-Klubo vojaĝis al Hanojo, kaj entute estis sep homoj de Aŭstralio. Ni certe renkontis multajn gesam-ideanojn kiuj tre afable farigis la eventon bonvenema kaj amikema. La temojn de Paco, Kunlaboro kaj Disvolviĝo mi opinias esti bonaj. Niaj gastigantoj ĉiam helpis nin pro la diversaj kulturaj fazoj kaj aspektoj de la ĉarma lando, kaj ni esperus sekvi iliaj ekzemplo kiel Esperantistoj. La promociado de Esperanto tie funkcias ege bone kaj ŝajnas al mi kiel unu de la plej bonaj. Ni certas ke ni lernis kiel promocii Esperanton kaj uzi ĝin inter junuloj per multaj diversaj rilatoj, kiujn ĉi tie en Aŭstralio ni certe bezonas provi, ĉar nuntempe la juna movado Esperanta ne havas tre grandan fortecon ĉi tie. Mi kaptis iom de la kongreso per filmilo kaj mi esperas ke vidbendetoj videblos en Youtube aŭ Farbskatol.net. Do, se vi interesiĝas pri tio, bonvolu kontakti min por pli da informoj.

Andy LUTZ



Haris SUBAŠIĆ, la tiama vic-prezidanto kaj nuna prezidanto de TEJO, kun LAI Thi Hai Ly, la LKK-prezidantino, dum la ferma ceremonio

Impresa Raporto pri la 63a Internacia Junulara Kongreso en Vjetnamio

Paz el Koreio skribis pri siaj impresoj de la 63a IJK en Vjetnamio de la 27a de Julio ĝis 3a de Aŭgusto, 2007.

Dufoje mi partoprenis en internacia kongreso. Fakte, post esperantistiĝo mia unuafoja sperto en Esperantujo estis partopreno en la 25a Komuna Seminario inter junuloj de aziaj tri landoj (Ĉinio, Japanio, Koreio) en Pekino, Ĉinio. Do la ĉi-foja sperto povas esti nomata unuafoja. Unuafoja vizito al Vjetnamio. Kaj unuafoja partopreno en internaci-skala kongreso plenesperigis min.

Alproksimiĝante al la kongreso, mi preparis prezenton pri "Korea Paca Movado".

Hanoja nokto plenplena de varmego kaj bruoj

La 26an de Julio, je la 10a vespere je loka horo mi atingis la flughavenon Noi Bai en Hanojo. Apenaŭ eliĝinte de la aviadilo malseka varmego aero sufokis min. Kvankam nokto profundigis, la temperaturo estis pli malpli 31 gradoj celsiaj. En flughaveno helpantoj de LKK atendis nin tenante Esperante surskribitan anoncan tabulon. Tie mi renkontiĝis kun Ricko kaj Sanŝiro el Japanio. Kaj kun s-ro Alexander el Israelo kaj



Grupfoto dum la solena malfermo

kelkaj helpantoj ni ekiris al la kongresejo (Fremdlingva Universitato en Hanojo) per taksio. Iu helpanto, kiu lernis esperanton nur dum 3 monatoj, flue parolis esperanton kaj klarigis pri ĉirkaŭa loko - ekzemple, la Ruĝa Rivero - dum ni veturis al la kongresejo. Pro ilia afableco ni povis facile trovi la kongresejon. Poste ni malŝarĝis vojaĝ-ekipaĵojn en modesta studenta loĝejo kaj salutis la unuan nokton en Hanojo. Ĉirkaŭ la loĝejo estis ŝoseo, do dum la tuta nokto ne ĉesis bruo de aŭtoj kaj motorcikloj. Sed strange oni ne povis facile trovi moskitojn, kvankam la vetero estis varma. Kun kora tremeto, ekscitiĝo, varmego kaj bruo la unua nokto pasis tiel.

Seninterpreta renkontiĝo kun nekonatuloj

La 1a tago de la IJK. Ni promenis en bazaro ĉirkaŭ kongresejo kaj manĝis unuafoje en vjetnama manĝejo antaŭ ol komenciĝis la oficiala programo de la IJK. Poste ni pasigis longan tempon por registriĝi al lakongreso. Post vespermanĝo Interkona Vesperto okazis. Komenciĝis la unua renkontiĝo kun partoprenantoj el la ses kontinentoj de la tergloba stelo. Ni, tute nekonataj fremduloj iom post iom interproksimiĝis per kantoj, dancoj preparitaj de vjetnamaj junuloj, kaj kelkaj ludoj. Aparte impresaj estis ludo por fari malgrandajn grupojn kaj alia ludo por parkerigi nomojn, kiujn s-ro Kim J. preparis. Ni interparolis seninterprete per unu lingvo: Esperanto. Ni nature fariĝis amikoj. Tiam mi amikiĝis kun Adjevi el Togolando, kiu vestis piedpilkman uniformon. Ŝajne tio estis ne realigebla renkontiĝo eĉ unufoje en tuta vivo fore de la mondo, tamen mi sentis tian renkontiĝon tre nature en kongresejo.

Prezento pri la Korea paca movado kaj historia konscio de Vjetnamio

La 2a tago. Dum la Solena Malfermo mia koro estis maltrankvila. Ĉar mia prezento pri la Korea paca movado ne aperis en la



Kantoprezentado de vjetnamaj junuloj dum la Interkona Vesperto

kongresa libro kaj la temo estis politike delikate akceptita de LKK, do ili volis antaŭvidi la enhavon de la prezento. Sed post la Solena Malfermo Hai Ly (prezidanto de LKK) ĝoje kaj agrable konsentis kun la prezento. Post meandraj iradoj de la aferoj kiel ŝanĝo de loko kaj tempo mi povis prezenti laŭ la ĉeftemo de la IJK "Paco, Kunlaboro, kaj Disvolviĝo".

En la 4a tago de la IJK (30an de Julio), matene mi streĉite ekkomencis prezenton antaŭ multaj homoj. La ĉefa enhavo de mia prezento estas jene: Unue, ekde 2003 koreaj esperantistoj memvole partoprenis en la paca movado. Due, necesas malkaŝi la veron, introspekto, apologio pri

masakrado de koreaj armeoj al vjetnamaj popoloj dum vjetnama milito 1964-1975. Trie, nuntempe la popoloj de Irako, Palestino, Libano suferas same pro milito, kaj tutmond-skala paca movado necesas por tuja retiriĝo de la armeo kaj fini la okupacion.

Tiam ankaŭ s-ro Renato Corsetti (eksprezidanto de UEA) partoprenis kaj li kuraĝigis, ke multaj diverslandaj Esperantistoj agas en paca movado diversmaniere, tamen eble ne ekzistas tiel vigla movado kiel la korea esperantista paca movado. Kelkaj homoj petis al mi, ke mi bonvole kopiu la prezentdokumenton kaj fotojn. S-ro T. Loi (vic-

prezidanto de la Vjetnama Esperanto-Asocio) diris, ke Vjetnamio ne forgesas estintecon de invadmilito, tamen estintaj invadintaj landoj nuntempe helpas multe por disvolviĝo de Vjetnamio. Ĝajne tia vidpunkto traktis paciĝon, pacon, kunlaboron en kadro de nuntempa ekonomia evoluigo de Vjetnamio.

Sed mi pensas, ke la viktimoj de la milito ne estas ŝtato mem, kaj esplori veron de antaŭa tragika milito, kompenso kaj apologio al viktimoj estas ne prokrastebla tasko por kritiki nuntempan militon.

La unua Mondo kaj la tria Mondo

S-ro Renato Corsetti elĵetis vortojn sencoriĉajn en solena malfermo. Se mi skizas ĝin laŭ mia memoro, proksimume jena:

"Ĉu nuntempe Esperanto-movado tutmonde ekzistas? Por ekzistigi aktuale tutmonda Esperanto-movado, ni bezonas subtenadon kaj prizorgadon al ĉirkaŭitaj lokoj kiel Sud-Ameriko, Azio, Afriko, k.a. Estas evidenta fakto en internacia ordo, ke malegaleco inter landoj kaj diversaj diskriminacioj ekzistas. Se ne estas movado por superponti tion, ni ne povas diri, ke ankaŭ tutmonda Esperanto-movado vere ekzistas."

Kvankam nekompareble al la trudo de la angla lingvo kiel internacia lingvo, tamen



Nokta bazaro en Hanojo



ankaŭ fundamentaj vortoj de Esperanto, kiuj estas bazitaj sur la komuneco de hind-eŭropaj lingvoj, povas iĝi barilo al neokcidentaj homoj. Simile tiel Okcident-Eŭropa alcentrigita politika, ekonomia, socia, kaj kultura supereco en internacia rilato nenegeble ekzistas interne de la Esperanto-movado.

Ĉu pro tia penso, mi pensis, ke oni tre grupe iris kaj venis aparte laŭ kontinentoj laŭ landoj en kongresejo. Inkluzive min ankaŭ koreaj partoprenantoj tro grupiĝis. Mi sentis, ke loĝejaj ĉambroj estis dividitaj laŭ nacio aŭ loko, kaj ke tio estis problemo. Eĉ se oni ne ekkonsciis tion, estis dividitaj la unua mondo kaj la tria mondo; tio estis honta afero. Ĉar memkonscio je aparteno al la unua mondo povas voki absurdan superan komplekson, kaj memkonscio je aparteno al la tria mondo povas voki minuskomplekson aŭ humiligan sklavemecon. En la kapitalisma tutmondiĝa realo ni scias, ke ne nur estas internacia malegaleco sed ankaŭ la unua kaj la tria mondo fariĝas unu lando. Do ni povas konfirmi, ke la memvola formiĝo de 'Homaro' nepre povas realiĝi nur per senĉesa rezisto kontraŭ malegaleco kaj subpremo en nia interno.

Ĉu seksa suferigo aŭ kultura diverseco

Mi devas rimarkigi alian aferon dum la kongreso en ĉi tiu impresa raporto. Kelkaj viraj partoprenantoj faris troajn korptuŝojn,

seksajn parolojn kaj kondutojn. Iu nomis tion problemo kaŭzita de kultura diverseco. Sed la problemo ne estas tiel simpla. Laŭ mia sento kaj laŭ iom da sintezo de eldiroj de kelkaj inoj, certe ekzistis korptuŝoj, seksaj paroloj kaj kondutoj, kiujn inoj ne volis. Tial tio estis seksa suferigo. Kvankam tio okazis en lud-spaco aŭ ekstere de oficiala programo de kongreso, la situacio ne ŝanĝiĝas. Ke iuj viroj brakumis inojn aŭ levis ilin en plena gajeco estis nenature, ĉagrenige por mi. Mi pensas, ke tio ne estas pro kialo, ke mi havas korean tradician konserveman seksan kulturon aŭ komprenon. Ja mi ne havas tian ideon. Kaj mi ne asertas tion por peti reglamentadon de LKK aŭ TEJO pri ia konkreta konduto. En luda spaco ofte okazas konfuza

atmosfero, utiligante la ŝancon, oni ne faru suferigan aferon al inoj, kiuj klopodis ne frakasi plezuran atmosferon. Levi demandon pri seksa suferigo estas ne nur alvoko por respekti inojn kiel personeca subjekto, sed ankaŭ ligiĝas kun respekto al alia kulturo, mi pensas. Por konfirmi translandliman komunikadon kaj amikecon, ni devas premisi reciprokan respekton kaj prizorgon.

Esperanto-movado kaj trans tio

En IJK estis multaj amikiĝoj, interesaj kuraĝigaj programoj, gajaj epizodoj super haŭt-koloro, nacieco, religio, rango, sekso, ktp. Mi bedaŭras, ke mi ne multe skribis gajan memoron kaj la belajn

pejzaĝojn, surstratajn homojn de Hanojo, Vjetnamio. Kaj mi bedaŭras, ke mi plendis kaj levis pezajn kritikajn demandojn pli multe. Tamen mi esperis sinceran debaton inter junuloj pri gravaj temoj, do la kongreso restigis al mi multe pli taskon ol ĝojon. Kien iras Esperanto-movado? Kial tiom multaj homoj kolektiĝis tutmonde kaj kion ni povas fari kune? Kiom la Esperanto-movado, kiu estas movado por realigi lingvan egalrajton tutmonde, povas kontribui por transpaŝi



Prezento dum la Solena Fermo de la IJK

tutmondan malegalecon, subpremon, diskriminacion? Aŭ kiom intime rilatas pri tia movado? Ĉu la problemo de lingva egaleco estas nur lingva problemo? Ktp.

La 63a IJK, kiu donis al mi multajn afliktaĵojn, finiĝis. Kaj nun mi staras ĉe nova deirpunkto, pensante kiel mi rilatu kun la Esperanto-movado kaj trans tio. Sed malgraŭ ĉio, mi transdonas mian saluton kun plezuro kaj danko al ĉiuj LKK-anoj, kiuj preparis la 63an IJK-n, vjetnamaj helpantoj, homoj de TEJO, koreaj partoprenantoj Younglong, Itaek, Hohosen, Lud, Biru, Kimdaek, kaj nun aperanta nomo Adjevi, Ando, Goshi, Laurent, Miranda, Andrew, Paola, Renata, Ricko, Sanshiro, Xin, Maria, Robert, Trang, Sky, Hoai, , kaj ĉiuj partoprenantoj de la IJK.

"Neniam mi forgesos ĝojan renkontiĝon kun vi! Kaj nia amikeco daŭros!"

Paz (Koreio)

Ĉi tiu artikolo unue aperis en La Solidareco (solidareco.cafe24.com)

Slava renkontiĝo

Slavoj el diversaj landoj renkontiĝis en bela mezgranda vilaĝo en Slovakio fine de julio. Temis ankaŭ pri Esperanto-aranĝo: ĝi estis elpensita de Esperantistoj, kaj lernado de Esperanto estis unu el la ĉefaj okupoj en ĝi. Sed ĉi tiu artikolo ĉefe traktas ĝian interesan kaj nekutiman flankon: la slavecon.

Estis preparita programo, en kiu estis diversaj prezentoj, prelegoj kaj diskutoj pri historio, vivo kaj kulturo de slavaj landoj. Partoprenis proksimume 50 homoj el Ĉeĥio, Pollando, Rusio, Slovakio kaj Ukrainio. Ili lernis lingvojn de la aliaj slavaj landoj kaj interkomunikiĝis sukcese, kvankam ne nur slavaj lingvoj estis uzataj.

Kial ĉi ĉio okazis?

Slavaj landoj estas lokitaj plejparte kune; dum la historio inter ili multfoje okazis militoj. Multfoje unu el la landoj prenis la alian. Sed memoro pri la antaŭaj ofendoj estas plejparte nur politika afero. Politikistoj ofte uzas ĉi tion kaj diras ke homoj de ĉi tiuj landoj havas negativan opinion pri la aliaj slavaj landoj. Fakte tamen homoj ne tiel multe memoras antaŭajn ofendojn.

Slavaj landoj estas ĝis nun konsidereble similaj. Slavaj lingvoj havas tri branĉojn – la okcidentan, la oriantan kaj la sudan. Inter ili

restis sufiĉe granda simileco, kiu plejparte ebligas interkomprenon sen longa studado de lingvoj, aparte de skribita teksto. Inter la lingvoj la slovaka estas la plej meza kaj do la plej komprenebla por slavoj nun konsiderataj kune.

Inter najbaraj – kaj ne nur najbaraj – landoj krom militoj okazadas ankaŭ penoj amikiĝi. Registaroj ofte faras de-suprajn decidojn amikiĝi, ili ordonas al siaj subestroj, tiuj al siaj subestroj ktp ĝis la homoj kiuj reale ion faras. Tamen estadas ankaŭ de-subaj iniciatoj de interlanda amikiĝo fare de simplaj homoj.

Kaj jen, ĉi-maniere de-sube malgranda aranĝo estis organizita fare de kelkaj entuziasmuloj.

La antaŭ kelkaj jaroj aperinta Interreto estas la unua teknika rimedo, kiu ebligas interkomunikiĝon, kiu bezonatas por de-suba amikiĝo. Ankaŭ en ĉi tiu okazo Interreto ludis la ĉefan rolon. En la retejo estis pendigita anonco kun aliĝilo.

Ankoraŭ unu afero, pri kiu eblas mencii, estis tio ke homoj volas ne nur amuziĝi aŭ nenionfaradi en sia libera tempo. Preparo de la aranĝo estas sufiĉe tempbezona afero, kaj ĝi ne rilatas al laboro de la homoj. Proksimume duono de partoprenintoj diris ke ili venis por lerni Esperanton.

Rezultoj de la aranĝo estas konsiderataj kiel sukcesaj, kaj ĝi estas planata por okazi la sekvajn fojojn, espereble kun pli multaj partoprenantoj. La ideo estas ke la aranĝo estos ĉiujara kaj okazados en ĉiuj slavaj landoj laŭvice.

Maksim Ĵitĉenko, Moskvo (Rusio)



Kiel fartas Esperanto en Alĝerio?

Esperanto malfortas en arabaj landoj. Kelkaj homoj esperantistiĝis, sed ĉiam temas pri unuopaj interesitoj, kiuj lernis pere de retaj kursoj aŭ de libroj senditaj de eksterlandaj organizaĵoj. Fakte ne ekzistas araba por-esperanta movado. La ununura asocio kiun oni povas trovi en la *Jarlibro* estas tiu de Libano. Mi bedaŭrinde devas konfesi ke la Libana Esperanto-Asocio havas nur nomon de asocio: mi mem spertis unujaran restadon en Libano kaj tie mi ricevis respondon de nur unu esperanto-parolanto.

Nova paŝo por Esperanto en arabaj landoj konsistis el starigado de asocioj. Fine de junio, tri francaj geesperantistoj flugis al Alĝerio por helpi al la afero. Ili renkontis dekon da homoj kiuj eklernis Esperanton ĉu dank' al la reta kurso de JEFO, ĉu pere de korespondado kun francaj esperantistoj. Grava kunveno okazis la 26an de junio 2007. Je la 15a horo ariĝis ok alĝeraj esperantistoj kiuj neniam antaŭe renkontiĝis. Ĉiu prezentis sin kaj oni komencis paroli pri Esperanto kaj ebloj en Alĝerio.

Antaŭ la fino de la kunveno, ili decidis ke oni baldaŭ kreu esperantan alĝerian Esperanto-asocieton. Tiu asocio arigos alĝeriajn geesperantistojn sed verŝajne akceptos subtenajn kotizojn de eksterlandanoj. Dum julio, ankaŭ okazis sukcesas Esperanta-staĝo en Alĝero.

Antaŭ tiu evento, la francaj vojaĝantoj petis materialon. Feliĉe ĉiuj grandaj Esperanto-asocioj kies sidejo estas en Parizo estis ege malavaraj. Unuiĝo Franca por Esperanto, Junulara Esperantista Franca Organizo, Sennacieca Asocio Tutmonda kaj SAT-Amikaro donis amason da libroj. La libraro konsistis el lernolibroj, vortaroj, kasedoj sed ankaŭ beletraĵoj kaj aliaj fakaj libroj. Post la



Dum Esperanto-kunveno en Alĝero

kunveno oni entute disdonis ĉirkaŭ 70 librojn. Por ke la librojn la plej multo povas konsulti, la partoprenintoj provos meti ilin ĉe publikaj bibliotekoj kaj kulturdomoj. Ĉar ili venis el diversaj urboj, oni povos trovi interesajn esperanto-librojn en Alĝero, Tizi-Uzu, Buira kaj Bejajo (interalie raraj libroj kiel la *Faraono* de Prus kaj *Homoj sur la Tero* de Stellan Engholm).

Por helpi la Esperanto-movadon en arabaj landoj kaj precize en Alĝerio, ne hezitu kontakti la Araban Komisionon de UEA. Ĉiu eŭro rikoltita servos por sendado de lernomaterialo kaj organizo de Esperanta staĝo.

François PARCHEMIN,
Prezidanto de JEFO (Junulara Esperantista Franca Organizo)

Utilaj diskutgrupoj:


- fr.groups.yahoo.com/group/araba-mondo
- groups.google.fr/group/Esperanto-algerie

Simbolo por la 100-jariĝo de UEA

19 aŭtoroj aŭ aŭtoraj duopoj el 12 landoj partoprenis la konkurson pri simbolo por la 100-jariĝo de UEA, festota en 2008. Preskaŭ ĉiuj sendis pli ol unu proponon aŭ plurajn variantojn de sama propono. Deklarante la konkurson la Estraro de UEA deziris, ke la simbolo "emfazu la 100-jaran historion de UEA kaj la aktualecon de ĝiaj celoj kaj idealoj", kaj ke ĝi estu "elvoka, laŭeble simpla kaj uzebla presite kaj elektronike".

Du UEA-Estraroj partoprenis en la prijuĝado. La malnova Estraro selektis kvin proponojn por la "finalo", lasante la finan decidon al la nova Estraro, elektita en Jokohamo. Tiu ĉi unuanime juĝis la verkon de Guillem SEVILLA la plej taŭga. La premiito estas 24-jara grafika dezajnisto el Barcelono, membro de Kataluna Esperanto-Junularo.

Guillem SEVILLA klarigas, ke la simbolo emfazas "per simpla kaj aktuala aspekto la tutteran disvastiĝon de la neŭtrala lingvo Esperanto, atingitan grandparte danke al UEA". La simbolo "subtile rilatiĝas al tra-



**100 jaroj
universala
esperanto-
asocio**

diciaj esperantismaj identigiloj (stelo), sed ĝi uzas ankaŭ eksterajn identigilojn (parol-vezikoj, kvin koloroj) rekoneblajn de la publiko, kiu ne konas la la esperantistan heraldikon". La elektita emblemo ne havas unu fiksitan formon, sed "temas pri fleksebla identiga sistemo kun senfinaj eblaj variantoj depende de la bezonoj kaj rimedoj".

Ĉi-flanke vi vidas nigrablankan varianton de la simbolo. Aliaj variantoj (inkluzive la kvinkoloran) troveblas ĉe la paĝo www.uea.org/dokumentoj/simbolo.

Laŭ RET-INFO (www.eventoj.hu)

500 studentoj eklernas Esperanton en Ĉinio

La 1-an de septembro 400 studentoj en nova semestro elektis Esperanton kiel nedevigan studobjekton en kvar kursoj funkciigitaj en universitatoj de Shenyang.

La 8-an de septembro 118 studentoj anoncis sin por du Esperanto-kursoj en la Universitato de Liaoning, sidejo de LEA (Liaoning-provinca Esperanto-Asocio, Ĉinio), kaj plue 80 studentoj eniris en kurson de Evoluata Historio de Esperanto en la sama universitato.

Post reveno de ĉefaj estraranoj de LEA al Ĉinio el la Jokohama UK, ĝi plenumis por alveno de nova semestro streĉajn kaj sisteman

laborojn:

- elekti Esperanto-instruistojn, inkluzive de disponeblaj instruistoj por aliaj kelkaj universitatoj kiuj planas enkonduki Esperanton.

- represi 1000 lernolibrojn "Esperanto-kurso de La Nova Jarcento"

- elekti Esperanto-kurson en la Universitato de Liaoning kiel provo-unuon de Masanori-Metodo pri Esperanto-instruado

Wu Guojiang (Vic-prezidanto de LEA Ĉinio)
Laŭ RET-INFO (www.eventoj.hu)

Esperanto-kurso en la universitato de Stokholmo

La 28-an de aŭgusto komenciĝis Esperanto-kurso en la universitato de Stokholmo. Ĉirkaŭ 30 homoj aliĝis al la kurso kiu okazos dum du semestroj kiel vespera kurso. (Kelkaj partoprenos nur la enkondukan kurson.) Entute estos kvar subkursoj:

1. Enkonduko al Esperanto (7,5 poentoj)
2. Interlingvistiko kaj konstruitaj lingvoj (7,5 poentoj) - instruos Hartmut Traummüller
3. Profundiĝo en Esperantoo (11 poentoj)
4. Pri la kulturo k movado de Esperanto (4 poentoj)

Dum la enkonduka kurso oni planas multe uzi lernu.net kaj retbazitan eduksistemon de la universitato kiu nomiĝas Mondo (iom modifita versio de sakajproject.org).

La instruistoj demandis al la kursanoj kial ili elektis partopreni la kurson, kaj ricevis

jenajn respondojn:

- por plibonigi siajn jamajn sciojn de Esperanto (ĉe kelkaj kun aldono "ĉar kredas je Esperanto kiel la mondlingvo", kelkaj jam parolas la lingvon)
- por ekscii iom pri Esperanto (interesiĝas pri lingvoj ĝenerale)
- por lerni paroli Esperanton (delonge volis fari tion, aŭ simple pro scivolo, aŭ ĉar iu amiko faris tion)

Plej multaj apartenis al la dua kaj tria grupo. La kursanoj estas interesa mikso de junuloj kaj maljunuloj (unu aĝas 78-jarojn, alia 77...), lingvemuloj kaj nelingvemuloj, kaj eĉ svedoj kaj nesvedoj.

Laŭ raporto de HOKAN LUNDBERG kaj SONJA PETROVIĆ-LUNDBERG

Beletra Almanako

En septembro 2007 estis lanĉita nova literatura periodaĵo, kiu komence aperas 2-foje jare kaj nomiĝas "Beletra Almanako" (BA). Ĝin redaktas Jorge CAMACHO (ĉef-redaktoro), Probal DAŚGUPTO kaj ERTL István (redaktoroj). Ĝin eldonas Ulrich BECKER (Mondial, Novjorko).

Amplekso de la baldaŭ antaŭnelonge aperinta 1-a numero estas 21x13 cm, kaj ĝi havas 176 paĝojn. Principe, la almanakon oni ne bezonas aboni anticipe kiel revuon, sed povas mendi aŭ aĉeti kiel libron. BA aperos en normala mezgranda libroformato, kaj ĝi estas facile mendebla, pagebla, aĉetebla, recenzebla aŭ donacebla al amikoj.

La prezo de BA estas 9 eŭroj. Aldoniĝas sendokostoj de 7 eŭroj ekster Usono kaj 2 eŭroj ene de Usono (tiuj sendokostoj validas por unu aŭ du ekzempleroj de la sama numero de BA; por pli da ekzempleroj kontaktu Mondial retletere: informo@librejo.com).

Se vi antaŭmendas BA2 kaj BA3 nun, vi ricevos BA2 kaj BA3 rabatitaj, por 6 eŭroj (plus sendokostoj).

Pli da informoj troveblas kaj enhavtabelo de la unua numero troveblas ĉe la paĝo www.librejo.com/beletra-almanako.

Laŭ RET-INFO (www.eventoj.hu)

E@I

La junulara organizo E@I (pri kiu aperis longa artikolo en la antaŭa numero de TT) meze de septembro estis akceptita de Eŭropa Junulara Fondaĵo (EYF) kiel internacia junulara organizo aganta Eŭrop-skale. Per tiu paŝo la faka sekcio de TEJO ekhavis

similan juran staton kiel la patrina organizaĵo, kaj tiu membreco ebligas al E@I memstare peti financajn subvenciojn ĉe diversaj forumoj.

Laŭ RET-Info (www.eventoj.hu)

Gerhard HIRSCHMANN en la koro de la verda familio en Afriko

Inda germana esperantisto, bona aktivulo esperante kaj mondcivitane (direktoro de la esperanta sekcio de AWC (*Association of World Citizens* – Asocio de Mondcivitanoj)) pere de sia afrika direktoro, François HOUNSOUNOU, planis vojaĝi en Afriko kadre de esperanto kaj mondcivitaneco.

La vojaĝo de Gerhard HIRSCHMANN en Afriko daŭris tri semajnojn; li prelegis en la urbodomo de Lokossa pri la lerneja partnereco inter *Sekundärschule Barleben* kaj la gimnazio *Fontaine de Vie*. Li sekve gvidis semi-narion en Lokossa por beninaj esperantistoj kaj mondcivitanoj. La seminario altiris 83 partoprenantojn el diversaj anguloj en Benino sub la temoj: Esperanto (la strukturo de UEA – utileco de Esperanto – historio de Esperanto – kiel organizi aranĝon sukcese) kaj mondcivitaneco. Ĉi tiu seminario daŭris preskaŭ kvar horojn. La enhavo de lia prelego ege interesis la partoprenantojn, kiuj poste demandis. Gerhard tre afable respondis al demandoj kaj adaptiĝis/alkutimiĝis al afrika kulturo pri pacienco. Li instruis al Francis AGBENOU (oficisto en la Afrika Oficejo de UEA) en Lokossa la oficejajn taskojn kaj ege provis pretigi la funkciadon de la paneinta presilo. Li vojaĝis al la publika lernejo Koĝi por renkonti la tieajn lernantojn, kiuj vigle parolas Esperanton.

Okazis en Lokossa la renkontiĝo de Gerhard kaj virinoj (produktantinoj de sapoj kaj afrikaj ŝtofoj) pri Esperanto kaj mondcivitaneco. Li konsilis la grupon lerni Esperanton. Gerhard renkontis Raoul HOUNNAKE, la ĉefoficiston de la Afrika Oficejo en Lokossa la 24an de aŭgusto 2007. Ili (Gerhard-Raoul - Francis kaj François) babilis en la Afrika Oficejo pri la

Afrika Oficejo. Gerhard havigis lernomaterialojn (poŝvortarojn – *ABC d'espéranto-Nouveau Cours rationnel et Complet d'Espéranto*) al Afrika Oficejo kaj al Afrika Centro Mondcivitana, kaj poste memorilojn al direktoroj en Afriko.

Notindas la helpo de Gerhard al afrikanoj pri patronado de infanoj. Li ĉeestis la geedziĝon (de kiu li estas la motoro) de François kaj Clémentine HOUNSOUNOU en la urbodomo de Lokossa.

Post Benino, li kaj lia afrika direktoro daŭrigis la vojaĝon en Niĝerio kaj Ganao tra Togolando. Gerhard prelegis en Ganao precipe en Akim Oda (Norda Ganao) sub la gvidado de landa direktoro, Alfred Arthur KOBINA, kiu aranĝis la restadon de Gerhard kaj François kun Paulo MESAHA. Ili ekskursis por viziti la plej aĝan arbon en okcidenta afriko en Ganao. Dudeko da esperantistoj partoprenis la seminarion kaj Gerhard registris iliajn petojn rilate al Esperanto. En Togolando, Gerhard pretis prelegi tie sed la tiea landa direktoro forestis kaj la seminario ne okazis. Rilate Niĝerion, la niĝeria ŝtato ne permesis al Gerhard viziti la landon kvankam 25 esperantistoj atendis lin. Tamen li sukcesis telefone babili kun ili por kuraĝigi ilin. Li renkontis Monday Anagovi, la niĝeria landa direktoro ĉe la landlimo al kiu li enmanigis materialojn.

La vojaĝo de Gerhard HIRSCHMANN estos ekzemplon por la aliaj. Mi petas ilin sekvi la paŝojn de Gerhard por progresigi Esperanton en Afriko ĉar la afrikaj esperantistoj bezonas spertojn de eksterafrikanoj en Esperantujo kaj en diversaj kampoj por evoluigi Afrikon.

François HOUNSOUNOU (Benino)

Dum la Internacia Seminario 2007/08 en Würzburg (Germanio) okazos internaciaj ekzamenoj de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) kaj UEA. Notu ke tiuj ekzamenoj nur malofte okazas, interalie ĉar oni devas anonci ilin tri monatojn antaŭ la ekzamensesio. La ekzamenoj konsistas el tri partoj: gramatika antaŭtesto kaj skriba kaj

parola partoj. Ekzistas du niveloj, elementa kaj meza. Pli da ĝeneralaj informoj pri la enhavo kaj kondiĉoj troviĝas en la retejo de ILEI: edukado.net/pagina/Internaciaj+Ekzamenoj/150

Detalajn demandojn kaj aliĝon sendu al Zsafia Korody <esperanto-zentrum@web.de>.

Informon pri aliĝo por la Internacia Seminario ĉerpu el la paĝo: internacia-seminario.de

Ĝeneralaj informoj pri TEJO

TEJO estas mallongigo de *Tutmonda Esperantista Junulara Organizo*. Ĝi estas la junulara sekcio de UEA, la *Universala Esperanto-Asocio*.

TEJO popularigas internacian kompreniĝon per renkontiĝoj, edukaj programoj kaj uzo de internacia lingvo, Esperanto.

La organizo defendas kulturen riĉecon de lingva diverseco, homajn rajtojn de lingvaj minoritatoj kaj tutmondan kompreniĝon per facila aliro al internaciaj kontaktoj. Uzo de Esperanto estas kadro de niaj klopodoj.

Retadreso: www.tejo.org

Centra Oficejo de UEA/TEJO

Nieuwe Binnenweg 176
NL-3015 BJ Rotterdam
Nederlando

Tel.: (010) 436 1044

Faksilo: (010) 436 1751,

Retadreso: uea@co.uea.org

Estraro de TEJO

• Haris SUBAŠIĆ (Prezidanto, IJK, Eksteraj Rilatoj)
Zagrebačka 80, BA-88000 Mostar, Bosnio-Hercegovino
Retadreso: hara@ikso.net

• Chuck SMITH (Informado, UEA-Rilatoj)
Leiblstr. 31, DE-74081 Heilbronn, Germanio
Retadreso: chuck@tejo.org

• François HOUNSOUNOU (Landa kaj Afrika Agado, ILEI-Rilatoj)
B.P. 226, BJ- Lokossa, Mono, Benino
Retadreso: frank@tejo.org

• Katja IGNATIEVA (Kasistino)
c/o Magnini via Don Minzoni 38, IT-20091 Bresso (Mi), ITALIO
Retadreso: katja@tejo.org

• Valentina SIDOROVA (Ĝenerala Sekretario)
3, rue des Nereides, 78180, Montigny-Btx, Francio
Retadreso: valentina@tejo.org

Membroservoj de TEJO

Kiel membro de TEJO vi ricevas:

- la gazeton TEJO Tutmonde
- la revuon Kontakto
- rabaton por la Internacia Junulara Kongreso kaj la Internacia Seminario
- eblecon partopreni en seminarioj
- eblecon havi blogon ĉe tejo.org
- eblecon involviĝi en interesa kaj internacia agado

Kaj tre grave: vi helpas al la junulara movado de Esperanto!

Se vi aĝas pli ol 30 jarojn kaj volas ĝui la samajn avantaĝojn (kaj revuojn) kiel membroj de TEJO, kaj aldone subteni TEJO-n, vi estas bonvenigata fariĝi Patrono de TEJO. (Pliaj informoj sur www.tejo.org/patrono aŭ de la Centra Oficejo).

Agado de TEJO

La agado de TEJO konsistas precipe el:

- informado en junularaj medioj pri la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj pri ĝia solvo per Esperanto
- praktika utiligo de Esperanto je la servo de la junularo kaj informado pri tio en junularaj medioj
- okazigo de kongresoj, konferencoj, seminarioj kaj aliaj kunvenoj
- instigado al la membroj de TEJO aktive partopreni en la esperanta movado.
- Aktivula Trejnado (pli da informoj ĉe www.tejo.org/aktivula_trejnado)

Subtenu la agadon de TEJO

Ekzistas multe da eblecoj helpi TEJO-n en sia agado. La plej gravaj estas membriĝi aŭ patroniĝi. Sed vi ankaŭ povas helpi al konkretaj agadoj de TEJO. Mondonacojn al ĝenerala agado de TEJO bv. pagi al la UEA-konto "tejtej" (indiku celon de donaco, ekz: "donaco por KER" aŭ "donaco por landa agado"). Ankaŭ eblas donaci tiel por specifaj celoj:

- Fonduso "Partoprenu IJK-n" - TEJO per ĝi subvencias la partoprenon de TEJO-aktivuloj al IJK
- Pasporta Servo - eble la plej fama eldonaĵo de TEJO

Por pliaj detaloj pri pagmaniero, bv. rigardi ĉe www.uea.org/alighoj/pag_manieroj.html aŭ demandi ĉe la Centra Oficejo.

TEJO dankegas vin pro via subteno!

La geedziĝo de François kaj Clémentine HOUNSOUNOU en Benino/Afriko



Nova vivo malfermiĝis al François HOUNSOUNOU, la TEJO-estranano pri landa agado kaj rilato kun ILEI. Post siaj vojaĝoj, kiuj spertigis lin, François elektis sian belan fratinan amon en Benino ĉar la bela kaj trankvila vivo troviĝas hejme. Tiel en Lokossa ĉe la urbodomo, geedziĝis la TEJO-estranano pri landa agado François HOUNSOUNOU kaj nia fama kudristino Clémentine ACAKPO la 25an de aŭgusto 2007. Partoprenis la direktoro de la esperanta sekcio de AWC (*Association of World Citizens* – Asocio de Mondcivitanoj) Gerhard HIRSCHMANN, kiu rondvojaĝis en Afriko kadre de Esperanto kaj mondcivitaneco. Gerhard HIRSCHMANN, inda kaj tre aktiva germana esperantisto, estas la motoro de la geedziĝo de François kaj Clémentine. La edza paro tre pretas gastigi gastojn en Esperantujo kaj mondcivitaneco.

La geedziĝo de Uljana kaj Marcos CRAMER

Je la 11-a de aŭgusto en Leipzig (Germanujo) geedziĝis Marcos CRAMER – la redaktisto de TEJO Tutmonde – kaj Uljana TSCHISTJAKOW (ĈISTJAKOW), kiu ankaŭ parolas Esperanton. Uljana naskiĝis en Sankt-Peterburgo (Rusujo) en 1985 kaj studas nuntempe orientan slavistikon kaj instruadon de germana lingvo al fremduloj ĉe la universitato en Leipzig. Marcos naskiĝis en 1984 en Bonaero, Argentino. En junio ĉi-jare li finis siajn studojn kaj faras nuntempe civilan servon ĉe organizo de justa komerco ankaŭ en Leipzig.

Dum la sama tago okazis matene la civila geedziĝo, tagmeze la rus-ortodoksa eklezia geedziĝo kaj vespere la festo.

